

MI ESTAS LA VOJO KAJ LA VERO KAJ LA VIVO

Moto: Sinjoro, donadu al mi forton por ŝanĝi tion, kion mi ŝanĝi povas, humilon por akcepti tion, kion ŝanĝi mi ne povas, kaj saĝon, por tion inter ili distingi...

I. Sinjoro, eĉ se ofte mi ne kapablas je ĉio tuj trovi respondon, donu, ke mi kun anima kvieto kaj humila menso akceptu, ke ĉio havas sian tempon difinitan per via Providenco, ke mi akceptu kaj danku por ĉio, kion donos al mi tiu ĉi tago, ke mi almenaŭ ĉiuhore kaj antaŭ ĉiu komencita laboro ne forgesu turni min kun peto kaj rememoro al Vi.

II. Ne permesu, ke mi estu superregata per peko kaj forgeso, ke ĉio, kion Vi sendas, estas helpo por bono al tiu, kiu fidus Vin, ke eĉ se Vi iam allasas provojn, neniam Vi forlasas, sed male Vi donas forton por superi ilin.

III. Kun konscio, ke en ĉio estas Via sankta volo, per la Sankta Spirito min instruu kaj subtenu, ke mi per la peko ne estu blindigita tiom multe, ke mi kapablu distingi malbonojn, kiujn mi faras.

IV. Dekutimigu min de senpacienco, incitiĝo, malamo, kolero, senpripensaj juĝoj, indiferecenteco, egoismo, avideco, klopodo sukcesigi proprajn sopirojn. Ke mi ne opiniu ĉion kiel memevidentan aferon, kaj ke mi super mia kolero ne lasu subiri sunon.

V. Instruu min persiste praktikadi ĉiujn virtojn, por ke mi al ili neniam malfideliĝu, ne lasu mian animon per angoro suferi kaj restadi en la peko, malkvieto, malcerteco kaj nekredemo, sed ĉe ĉiu misago min, mi petas, levu.

VI. Por ĉio mi al Vi dankas, por la graco, per kiu Vi donacas al mi ĉiun tagon, en kiu Vi donas al mi eblecon esti pli bona kaj pli utila – por mia prospero kaj Via glorigo.

VII. Gardu mian animon kontraŭ pereigaj inklinoj, danĝeroj kaj tentoj de la mondo; ke mi ĉion faru pro la amo kaj kun la amo kaj mi sentu pacon en la animo kaj ĝojon en la koro kune kun miaj proksimuloj.

VIII. Instruu min agadi afable rilate al ĉiu proksimulo, ke ni nenium malĝojigu kaj al neniu faru maljustaĵon, al neniu reciproku maljustaĵojn, sed male mi rilate al ĉiu estu lumo kaj modelo disdonanta ĝojon al ĉiuj, kiujn Vi sendos renkonte al mi.

IX. Ke mi estu kontenta pri tio, kion Vi per Via graco donadas al mi kaj pri tio, ke mi ĉiam estu tie, kie Vi volas min havi.

X. Sendu, mi petas, ĉiam ĝustatempe Viajn helpantojn kaj inspirojn, precipe en la momentoj de malforteco, aŭ de ebleco, ke mi povus malbonfari. Donu al mi kapablon ĉiam ĝuste distingi Dian inspiron kaj Dian voĉon disde la voĉo de racio kaj pasioj.

XI. Ke mi kapablu kun ĝojo liberigi min de aferoj nebezonaĵ kaj superfluaĵ kaj ĉiam mi zorgu pri la eternaj valoroj. Donadu al mi forton, precipe kie mi estas plej malforta kaj donacu al mi Vian pacon.

XII. Sinjoro, donadu al mi kapablon sperti Dian protekton, Vian benon, mizerikordon kaj ŝirmon kontraŭ malbono videbla kaj nevidebla; lumigu kaj rektigu mian vivovojon; instruu min neniam perdi esperon, havi ĝustajn petojn kaj intencojn, ĉion kun danko akceptadi, helpadi al bezonuloj kaj konstante pardonadi, por ke mi tiun donacon – tiun naskon – ne vantigu! Tiel okazu!

(Aŭtoro anonima)